

Gazeto Andalusia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

13a Jarkolekto

*

Junio, 1996

N-ro 46



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (joser@lander.es).

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Fondo informático de AEU.

Efika Esperantismo / 13	3
Intervjuo al samideanino Luz Vázquez	5
Financa Raporto de AEU	6
Sami Deano (Komikso)	7
Informe sobre el Esperanto 2.0b	8
Decimala sistemo por mezuri la spaco-tempo	10
$e=mc^2$	11
Krucvorttenigmo	12
Helpu per via letero...	14
Poezia angulo	15
Esperanto en la lernejo	16
10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj la Sporto	17
Paĝoj de nia Historio	19
Radioamatora angulo	20
Esperanto Aplikata	23

Novaj ĉi-numera: komuniku kun ni ankaŭ rete. Unu el niaj redaktoroj havas retadreson (legu pli en la paĝo 9).



Efika Esperantismo / 13

Kvankam Zamenhof neniam parolis pri idealismo, sed pri ideo, multaj antaŭtempaj esperantistoj konsideris sin idealistoj. Kio estas idealisto? Idealisto konceptas idealon kaj revas pri ĝi, multfoje sen konsidero al la ebleco aŭ neebleco atingi ĝin.

Pri tio multfoje aŭ preskaŭ ĉiam la direkto de la socia evoluo ne kongruas kun la idealoj, tute kontraŭe, sub la realismo oni priiras la idealistojn, kiel revolujn, kiuj ne tuŝas la realon. Sed la realistoj, kiuj diras, ke iliaj piedoj paŝas surgrunde, nur priokupiĝas por si mem kaj la nunon.

Al franca reĝo oni atribuis la moton "post mi la Diluvo" kaj lia posteŭlo Ludoviko deksesta estis senkapigita de la Franca Revolucio. Tamen, idealismo estas persona afero, neniu estas devigata akcepti aliajn idealojn.

La evoluo de la socio estas rezulto de la tuta pasinteco, estas la irado ĝis hodiaŭ voje al la estonteco.

Ĉu la estonteco ne dependas de la konduto kaj agado de la nuntempuloj? Hodiaŭ en granda parto jes! En la antikveco malmulte. Ju pli konscia estas iu socio des pli povas influ la estontecon, ĉar tiu influo dependas precipe de la konduto kaj pensmaniero de la nomataj homamasoj.

Ni naskiĝas en determinita socio, ĝi povas esti pli justa aŭ malpli justa laŭ propra vidpunkto, sed ĝi estas tia, kian ni trovis de naskiĝo. Ĉu ni denaske jam rajtas vivi en justa socio? La justeco havas multajn difinojn, sed fakte la koncepto justeco rilatas al la kulturo, ne al la naturo. La naturo per si mem estas indiferenta kaj al la bono kaj al la malbono, kaj tiel same al la justeco kaj al la maljusteco. Estas nature, ke ĉiu vivulo por sin subteni devas manĝi aliajn vivulojn. La herbovoraj manĝas herbon, sed la karnovoraj manĝas herbovorajn. Ni mem, homoj, manĝas viandon, ne pripensante pri buĉejoj, kiuj provizas ĝin. Sekve, la natura ekvilibro estas terure drastra.

Civilizita homo ne vivas laŭnature, sed laŭkulture. Vivas en organizita socio, kies perfekteco aŭ malperfekteco dependas de la homa agado. La justeco aŭ maljusteco de la socio, eĉ la homaj rajtoj, apartenas al la kulturo, kaj la kulturon oni ne havas denaske. Oni devas lerni ne nur la instruon sed ankaŭ la moralon, kiu rilatas la konduton.

Subnome de realismo sin profitas de la hodiaŭa civilizacio kaj kulturo, sen konsidero se tiu teniĝo kontribuas al pli humana socio aŭ malhumana socio en la estonteco. Precize nia agado por la estonteco indigas nin por des pli bona socio, ĉar ni kontribuas al tiu plibonigo. Nenio-farantoj ne meritas pli bonan socion, ĉar ne kontribuas al ĝia plibonigo, plibonigo, kiu unue devas komenci en ni mem, sen atendi, ke unue pliboniĝu la aliaj.

La paco, la interkompreniĝo de la popoloj kaj la enkonduko de la homarunuĝo jam delasis esti idealismoj, nuntempe estas devigoj, plenumendaj de ĉiu el ni, individue kaj kolektive.

Ni, esperantistoj, jam ne devas sin prezenti kiel idealistoj, sed kiel la plej realistoj. Oni devas evoluigi la aktualan socion al la humanigo de la homo, humanigo de la historio, kaj



humanigo de la historio, tio estas sen militoj, sen perfortaj revolucioj kaj kun la forigo de la terorismo. Tiuj humanigoj estas nur plenumebraj je monda skalo ĝis homarunuigo, kiu estas nova etapo en la civilizacio.

La Espero parolas iom pri tio, kaj Zamenhof kreis la lingvon Esperanto precize por ebligi la homarunuigon: "La popoloj faros en konsento, unu grandan rondon familian".

La unuigo de la homaro devas alveni per propra volo de la homoj, tio estas en libereco. La tasko estas senmezura sed plenumenda. Kunportas ŝanĝon de la pensmaniero, kiu devas esti enkondukata per la lingvo Esperanto, ĉar ĝi estas tute neŭtrala pri naciismoj, Ĝi estas supermacia, tio estas tutmonda.

La afero urĝas, ĉar nia tempo estas riskoplena. La atomenergio avertas la homaron, ke fine ĝi devas esti unuigita por certigi la pacon kaj enkonduki solidaran civilizacion.

GIORDANO MOYA.



(Daŭrigo de la paĝo 14)

elsendoj!

Komprenu bone, temas ne simple pri hungaria afero, sed pri prestiĝo de E-o en lando, kiu multe kontribuas al nia Esperantio! Viajn leterojn (kaj de viaj konatoj, amikoj) bonvolu sendi al la ambasadoro de Hungario en via lando! Ĝi estas grava, ĉar tiuj leteroj nepre eniras la oficialan ŝtatan kanalon, kaj devige havas spurojn en la administrado!

La skribado de letero por vi kostas nur kelkajn minutojn, sed por la prestiĝo de Esperanto ĝi signifas tre multon! Neniu alia gardos niajn interesojn, se ni mem ne faras ĝin! Ni kalkulas ankaŭ je via helpo.

LÁSZLÓ SZILVÁSI

REDAKTORO DE *EVENTOJ*



Beletra Konkurso

Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia Esperanto-Unuigo organizas la Beletran Tradukan Konkurson *José Rodríguez Huertas*. Nur eblas konkursi per tradukoj en la hispanan de originaloj verkitaĵ en Esperanto.

La limtempo de akceptado de la verkoj finos la 31an de oktobro, 1996. Tiurilate la poŝta stampo atestu la daton. Oni devas sendi la verkojn al Sindicato Nacional de Escritores Españoles, Apartado 632, E-29015 Málaga, Hispanio / España.

La tutan regularon oni povas legi en *Gazeto Andaluzia* 45 aŭ ricevi de la redaktoro.



Intervjuo

Ĉi foje ni intervjuas samideaninon Luz Vázquez, de Reus (Taragono). Ŝi laboras por Esperanto en kataluna radistacio.

GA: De kiam vi laboras por diskonigi / disvastigi Esperanton?

LV: De antaŭ tri jaroj nur. Mi estas malfrua, freŝa esperantistino malgraŭ la aĝo. Mi jam legis pri la Internacia Lingvo antaŭ dekkvin aŭ dudek jarojn. Iu sendis al mi leteron kaj resuman gramatikon kaj vortareton. Sed miaj gefiloj tiam estis infanoj kaj mi devis prizorgi ilin, mi ne havis tempon por io alia kaj forgesis la aferon. Bonŝance antaŭ tri jaroj mi legis artikolon aperintan en la revuo *Integral*. Ĝi agis kiel vekilo. Mi pripensis esperanton, la ideo aspektis bonege kaj mi komencis lerni la lingvon per koresponda kurso de KEA.

GA: Kial vi uzis tian kurson?

LV: Ĉar en tiu momento ekzistis neniu grupo en mia urbo, en Reus, kaj neniu ĉeesta kurso. Kaj solece estas malfacile studi, ĉar la urĝaj tagaj aferoj kaptas la atenton. Pro tio mi decidis formi grupeton por lerni kune.

GA: Kial vi lernis Esperanton? Kio de ĝi allogis vin?

LV: Precipe ĝia reguleco. Mi instruas en baza lernejo la katalunan kaj la hispanan kaj mi konstatas, ke la infanoj dediĉas la plejparton de la tempo por la lingvoj al la akiro de la komplikaj ortografioj anstataŭ al la perfektigo de la komunikado kaj

komprenado. Kurson post kurso la kompatindaj gelernantoj batalas, ĉu g ĉu ĵ, ĉu ss ĉu ĉ, ktp.

Neniu lingvisto kuraĝas meti ordon en tiu arbitraĵaron. Ili parolas pri etimologio... pri tradicio... Eĉ estas homoj kiuj taksas la riĉecon de lingvo laŭ la abundo de tiuj nepravigeblaj malfacilaĵoj. Mi neniel kunsentas kun ili. Miaopinie, la riĉeco de lingvo konsistas el la ideoj kiujn oni kaptas aŭ esprimas pere de ĝi. Ĉi tio gravas, la ideoj.

Do... malkovri lingvon sen ortografiaj esceptoj, nek gramatikaj, lingvon atingeblan de ĉiu kapkapablo, entusiasmigis min. Mi enamiĝis al Esperanto pro tio, ke mi amas la homaron kaj mi deziras, ke ĈIUJ povu plene atingi sian lingvon kaj alian por kompreni kaj esti komprenata ĉie. Sed la terura vero estas, ke nur tiuj apartenantaj al klera familio, tiuj kiuj havas monon povas alveni al plena uzado de sia lingvo ĉiunivele, eĉ la arta, tio estas la literaturo. Des pli malbone rilate al la fremdaj lingvoj. Kial oni devas viziti advokaton por kompreni la tekstojn de la leĝoj? Ĉu vi scias?

GA: Kion vi faris kaj faras nuntempe?

LV: Ni organizis prelegojn en *Centre de Lectura* de Reus, ekzemple tiujn de István Kabok, Salvador Gumà aŭ



Denis Keefe. Mi diras *ni*, ĉar S. Gumà ĉiam helpis min. Ankaŭ aliaj personoj kunlaboris pli-malpli. Ni gvidis kurson por komencantoj. Ĉijare, krom la kurso, ni pretigas radiprogramon pri Esperanto en loka radiejo.

GA: Kiel vi vekis la intereson de la radioelsendantoj?

LV: Fakte la ideon havis ili. Okazis, ke mi konis, hazarde, en junulkunveno de KEA, s-ron Floreal Martorell, *Flo*, respondeculo de *Rok-Gazet'*, el Tuluso. Li informis min, ke junuloj elsendantoj de liberecana revuo volus aperigi en ĝi kurson de Esperanto kaj ke unu el ili estis laboranta ankaŭ por liberecana radistacio. Mi kontaktis kaj komencis meti informojn en tiun gazeton kaj, kiel sona helpo, ni (Joan Marimon grave agis en tiu afero) komencis programon pri Esperanto en *Punt ó Rádío* (104.0 FM) de Reus, en februaro 95. *Internacia voĉo* ĝi nomiĝas.

GA: Kion enhavas via programo?

LV: Novaĵojn, muzikon, esperantkurson, intervjuojn, proverbojn kaj lastatempe ni parolas ankaŭ pri lingvoj, pri lingva situacio eksterlanda. Ĝis oktobro la programo estis duonhora, sed nun ĝi daŭras unu horon.

GA: Ĉu ĝi okazas en ĉiu semajno?

LV: Jes, ĉiumarde, de la 21a ĝis la 22a.

GA: Ĉu tiu laboro ŝtelas multe da tempo?

LV: Kompreneble. Oni devas serĉi la sonorajn materialojn, kalkuli la daŭron de ĉiu ero, de ĉiu parto, skribi ju pli des pli bone... Legi kaj respondi la leterojn, danki la ricevitaĵojn, aliĝi al AERA... Mi ofte dezirus lasi la aferon sed mi pensas, ke iu devas plenumi ĝin, ĉar ĝi estas grava.

Krome, de tempo al tempo ni aperigas artikolojn en la ĵurnaloj kia, ankaŭ estas grava bezono, ĉu ne?



Financa Raporto de Aeu (je la 31-decembro-95)

Enspezoj		Elspezoj	
Favora saldo antaŭa	295218	Poŝto	23685
Ordinaraj kotizoj	102687	Telefono	187
Instruado	63539	Ĉe papervendejoj	20110
Rentumoj	310	Fotokopioj	53780
Loterio	129200	Ŝparkaso	1185
Jarenspezoj	295736	Loterio	82600
Entute	590954	Kongreso HEF	2500
		Peña <i>El Sombrero</i>	500
		Entute	184547
Saldo favora	406407		



KOMIKSO

Sami Deano

KOMIKSO

Marks' asertis ke la religio estas la opio de la proletaro



Sed, pasinteco, Sovetunigo diplomat-rilatis kun Vatikano-urbo



Poste, oni diris ke la konsumad-socio stultigas la homojn



Tamen, ni, la homoj, renkontigas an asociaj kiel Greenpeace, Medicus-Mundi aŭ en la Esperanto-Movado.



Do, mi pensas ke...



...tio kio certe dormigas kaj stultigas la homojn estas la NACISMOJ.

Kaj ofte ĝi eĉ igas nin murdistoj





Komputiloj


Informe sobre el Esperanto 2.0b

Jen denove novaĵo pri komputila programo (memoru pri Perkomputila Esperanto-Kurso -PEK-, en *Gazeto Andaluza* 43). Pri kio temas ĉi tiu *Informe sobre el Esperanto?* Kaj kial tiu *2.0b*?

Nu, komencante de la fino, *2.0b* signifas dua versio, b. Antaŭ preskaŭ jaro jam troviĝis en kelkaj komputilaj bultenejoj unua versio, kiu fakte temis nur pri adaptigo al *Windows* de la helpdosiero de PEK. Tamen, ĉi tiu nova versio ne estas nur adaptigo, sed modernigo kaj pliigo (kun la aldono de son-kapabloj, i.a.). Kaj *b* signifas ke ekzistas versio *a*. Versio *2.0b* estas prov-versio, senpage havebla, sed nekompleta (mankas multaj esperantaj fonemoj, kaj enestas nur unu muzikpeceto). La tuto bezonas nur unu disketon 3½colan, de alta denseco. Versio *2.0a* estas paga, sed ampleksas ĉiujn sonojn: ĉiujn fonemojn kaj multajn muzikpecetojn, pli bonkvalitajn. Ĝi haveblas per kvin disketoj.

Se vi jam vidis la PEK-on, vi konstatis ke krom la kurso, la programo entenis informojn pri Esperanto, nia lingvo, literaturo, ktp. PEK havis kelkajn problemojn: pro tio, ke oni volis, ke ĉiu komputilo kapablu funkciigi ĝin, la programo baziĝis sur DOS; tio implicis, ke oni uzu nur ASCII literojn, do, ne la esperantajn literojn. La solvo estis facila, komoda por la programisto, sed ne bonaspekta. Krome, la priskribo de la sonoj de Esperanto estis iom teoria: surbaze de komparoj kun la sonoj de aliaj lingvoj, oni povis alproprigi al si la sonojn. Tamen, kio pri tiuj personoj, kiuj ne konis aliajn lingvojn? Tiuj ne povis bone asimili sonojn kiel ĝ, ĵ, ŝ, z, c...

La aŭtoro provis solvi tiujn du problemojn. Ĉi tiu *Informe sobre el Esperanto* estas dosiero (en la hispana lingvo, kiel videblas, de la titolo) bazita sur la helpdosieroj de PEK, tamen modernigitaj kaj pliigitaj. Li prezentas la dosieron pere de Helpdosiero por *Windows*. Do, ne ĉiu komputilo kapablos uzi ĝin (tamen ja ĉiuj aĉetitaj dum la lastaj tri kvar jaroj). Fine videblas surekrane ĉiujn esperantajn literojn (foje eĉ kolore). Ĉi tio solviĝis pere de speciala litertipo por *Windows*. La modernigo de la dosiero estas evidenta se oni komparas adresojn de asocioj, informoj pri UKoj aŭ,





plej moderne, iuj gravaj esperantistaj adresoj de *Internet*.

Pri la fonetiko de esperanto, la solvo estas duobla: en la dosiero enestas priskribo de la sonoj kiel tiu de PEK, ekz.

La V de **vin**o suena como V en inglés **very**, francés **vin**, portugvés **vida** o italiano **vita**, o como la W en alemán **Wein**. Se pone la boca como para decir F y se emite un zumbido sonoro con las cuerdas vocales.

Sed krome, nun eblas aŭskulti la sonojn! Klikante la muson sur ikono de laŭtparolilo, oni povas aŭskulti vorton kiu entenas la sonon. Tamen ekzistas limo (pli precize, bezono): nepras, ke la komputilo havu paroligan ilon, laŭnome *SoundBlaster* aŭ similan.

Eĉ eblas aŭskulti pecon de la esperanta muziko. Estas nur peceto, kaj la kvalito ne estas tre bona, pro tio ke la intenco ne estas disdoni profesikvalitajn musikaĵojn, sed diskonigi la muzikon en la internacia lingvo. En la paga versio haveblas pli, kaj kun kvalito simila al tiu de kasedo.

Kiel haveblas ĉi tiun informon? Diversmaniere. Ĝi verŝajne baldaŭ aperos en KD-ROMa revuo, same kiel PEK. Ĝi jam disponeblas en diversaj komputilaj bultenejoj, kaj, se vi ne trovas ĝin ie ajn, vi povas sendi disketon kaj afrankitan (per 42 pesetoj ene de Hispanio) koverton al la redaktoro, kiu tuj havigos ĝin al vi.

Jen programo por tiuj personoj kiuj iam aŭskultis ion pri Esperanto, kaj volas scii ion pli. Bonvolu diskonigi ĝian ekziston speciale inter NE-esperantistoj.

SIZIFO



Plia novaĵo komputila:

Ekde la monato Majo, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas ankaŭ kontaktebla en la reto INTERNET. Nia adreso en la elektronika poŝto estas: joser@lander.es.

Ni jam prilaboras por ke oni povu viziti nin pere de TTT, aŭ la *Web*, kiel oni diras en la ĵargono.

Ankaŭ HEF alireblas pere de la e-poŝto. Ĝia adreso estas esperanto@canaldinamic.es



La Decimala Sistemo por mezuri la Spaco-Tempon

La 'spaco' estas, ekde la homa vidpunkto, nefinita, je etimologia senco, t.e., nedifinita, kaj konsekvence, nemezurebla; tamen, ni povas mezuri ties kelkan parton.

Laŭ l' eŭklida geometrio, la spaco havas tri dimensiojn, t.e.: longitudon, larĝecon, kaj altaĵon; ĵuse, la Teorio de la Relativeco de Einstein interpretas la tempon, kiel kvara dimensio, t.e., l' evoluo de l' astroj; tial, ni nomas nun tiun fenomenon kiel 'spaco-tempo'. Tamen, nefinitaj dimensioj en la spaco povus ekzisti teorije, kiel la matematiko konceptas, potencigante ĝis l' infinito la longitudon — l' 1×10^E infinito.


Por mezuri la spacon-tempon ni devas havi du arbitrajn elementojn: unue devenon kaj due unuon de mezuro; ekzemple, ni mezuras geometrie kaj kvante per sistemo de kartesaj aksoj kaj de nombroj, ekirantaj ekde la deveno nulo (0) kaj de la unu, je la du, tri aŭ plu dimensioj de la variemo, tiel je positiva direkto, kiel negativa por enhavi ekde la $-\infty$ ĝis la $+\infty$.

Dum sia evoluo, la homaro elpensis diversajn sistemojn por mezuri la spacon-tempon, laŭ epokoj kaj popoloj. Tiel, la kaldea popolo mezuris la tempon per periodo de la luna turniĝo ĉirkaŭ la

tero. Tiel, ili fiksas je sia kalendaro: la daŭron de la 'semajno' de 7 tagnoktoj, kiel la periodo de unu luna fazo, kaj la daŭron de la 'monato' de 28 tagnoktoj, kiel proksimume la luna turniĝo ĉirkaŭ la tero, kiun ili nomis 'monato'. El tiuj mezuroj la babilona popolo adoptis ankaŭ la 'sesdekan' sistemon por mezuri la spacon-tempon:

- la mezuro de la sfero, dividita je 4 kvaronoj po 90 'gradoj' ($4 \times 90 = 360$), ĉiuj gradoj dividitaj je 90 'minutoj', kaj ĉiuj minutoj je 90 'sekundoj'.
- la mezuro de la 'jaro' je 12 monatoj po 30 tagnoktoj ($12 \times 30 = 360$), ĉiu tagnokto dividita je 24 'horoj', ĉiu horo je 60 'minutoj', kaj ĉiu minuto je 60 'sekundoj'.

Tiu sesdeka sistemo por mezuri la spacon-tempon daŭris, pro diversaj historiaj kialoj, ĝis hodiaŭ; tamen ekzistas ankaŭ aliaj sistemoj de numerado, precipe la binara kaj la decimale. La binara sistemo disvolviĝis nuntempe por elektronikaj procesoj, ĉar tiuj karakteriziĝas de nur du statoj — reprezentitaj de du ciferoj: neŝaltita — valoro 0 — kaj ŝaltita — valoro 1 —; tiel, ni havas sistemon de mezuro komponita de deveno — 0 — kaj de unuo — 1 — per nur du digitoj. Tamen, por la plimulto de



$$e = mc^2$$

Dek Jarojn post Ĉernobil'

La amaskomunikiloj memorigas nin ke ĝuste antaŭ dek jaroj okazis en Ĉernobil' la plei grava akcidento en la historio de la atomenergio. Tamen ekzistas malmultaj fidindaj konitaĵoj pri kio ia okazis, pri la rezultoj de tiu katastrofo kaj ĉefe pri kiom da tempo estos necesa por forgesi ĉiajn konsekvencojn.

Tiu nokto, la 25an de Aprilo de 1986, la inĝenieroj de la Atomcentralo en Ĉernobil' decidis eksperimenti, ili pretendis malpliigi la potencon

atingante la saman kvanton da energio. La reaktoro suferis abruptan pliigon da potenco kaj post kvardek sekundoj okazis eksplodo kiu levis la ŝtonplaton kiu kovris la reaktoron; tiel la atomenergio forkuris libere tra la aero.

La postaj televidbildoj estas sufiĉe konataj: la laboristoj kaj soldatoj en helikopteroj kovrante per tero kaj sablo la kernon de la atomcentralo, dume la atomenergio vagadis tra la atmosfero. Informo de UN indikas ke la infektata areo egalas al 160.000 kvadrataj kilometroj, zono iom pli granda ol Andaluzio. Oficiale la akcidento provokis nur 31 mortintojn, tamen post 10 jaroj oni jam parolas pri dek mil mortintoj kiel rezulto de la akcidento, ĉefe pro leŭcemio, haŭtkancero kaj genetikaj malsanoj.

Kontraŭe, post ĉi 10 jaroj, la sekureco en la atomenergiaj centraloj kreskis, la registaroj timas novajn akcidentojn, en Hispanio eĉ fermiĝis la centralon Vandellós-I en la provinco Taragono. Nuntempe ekzistas en la mondo 434 atomenergiaj centraloj kiuj produktas 17 procentojn de la energio; en Hispanio 9 centraloj produktas trionon de la energio. Tamen post 10 jaroj la mondo timas, malpli da personoj defendas la atomenergion, male tiuj kiuj luktas kontraŭ ĝi trovas en la bildoj pri Ĉernobil' novajn argumentojn malfavore al energio kiu iutempe estis nomita pura kaj fruktodona.

Aldone al la artikolo publikigita en la pasinta numero sub la titolo *Ĉu Zamenhof pravis?*, laŭ eŭropaj ĵurnaloj, la ekonomispertoj de la Eŭropa Unuiĝo decidis ke la nomo de la centono de la nova monunuo *eŭro* devas esti *cent*. Verŝajne Zamenhof pravis.



Krucvortenigmo



Horizontale

- 1 Homo kiu perdis la kapablon uzi membron pro vundo aŭ malsano.
- 6 Plej granda di' en la romia religi'.
- 8 Mallonga romano.
- 10 Naŭa liter' de la greka alfabeto.
- 12 Cikloforma.
- 14 Tie kreskas kaj evoluas la fet'.
- 15 Sufikso verba.
- 16 Pez' de ĉia entenantaĵo en kiu

Vertikale

- 1 Rilata al surŝipa ĉambro.
- 2 Traduki buŝe.
- 3 Prepozicio.
- 4 55 romianoj.
- 5 Aviadil'.
- 6 Elektre ĉargita form' de atomo, kiu perdis aŭ akiris elektronojn.
- 7 Plenda.
- 9 Loĝant de iu respubliko ĉe la Balta Maro.
- 11 Oredoloro.
- 13 Kaŝe observi.



- estas enpakita ia varo.
- 17 Subtenas.
 - 19 Rilata al alta montaro.
 - 21 55 Romianoj.
 - 22 Nomo de litero.
 - 23 Rilata al iu fabela besto, kun aglaj kapo kaj flugiloj kaj leona korpo.
 - 25 Respektoplena al Dio kaj religiaj aferoj. (inverse)
 - 26 Espriman aspekton de la vizaĝo.
 - 27 Uzi la rajton forĵeti provizore decidon de la parlamento (ekz., la prezidanto de Usono), inverse.
 - 28 Longa stango el metalo (inverse).
 - 30 Greka prefikso, uzata en medicino kaj zoologio.
 - 31 Frakcio.
 - 18 Profunda dormo.
 - 20 En la lingvo de la blankaŭta indiĝena loĝantaro de la plej norda insulo de Japanio (Jezo).
 - 24 Termin' por etaj kaviĝoj en la retino, ekz.
 - 25 Herbo kaj bulbo tre uzataj por kuiru.
 - 26 Oblo de cent.
 - 29 Prepozicio.

Jen la solvo al la krucvortenigmo de *Gazeto Andaluza* 45:

Kelkaj legantoj skribis al ni, ke la difino 2 Horizontale ne kongruis kun la solvo ORO. Kaj ili pravis! Tial, ĉifoje neniŭ atingos premion: sed la nuna enigmo havos du premiitojn.

Sendu vian solvon al la redaktoro (p.k. 5184, 29080 Malago) antaŭ la 15a de aŭgusto, 1996.

J	A	N	U	A	R	O		D	U
O	R	O		L	E	R	N	A	S
H	I	M	N	O		L	I	N	
A	S	O		J	U		O	K	S
N	T		Ŝ		R	A	B		V
O	O	M	O	T	O		A	Ĉ	A
	F	I	G	O		E			H
L	A		U	L	I	S	O		I
E	N	O	N	O		T	A	B	L
G	O	L	O		L	I	Z		O



Helpu per via letero al la prestiĝo de Esperanto

Multaj konsideras Hungarion kiel dua patrujo de Esperanto. Danke al multjaraj klopodoj, en Hungario oni povas fari ŝtate rekonitan lingvo-ekzamenon (laŭ kiu multaj entreprenoj pagas kromsalajron), ekzistas aparta E-katedro en la Budapeŝta Universitato, E-o estas instruata en multaj lernejoj, en pluraj universitatoj oni edukas diplomitajn E-instruistojn, la ŝtato finance subtenas la agadon de la junulara kaj plenkreska E-Asocioj, la nomoj de Baghy kaj Kalocsay verŝajne estas konataj por ĉiu klera esperantisto, ktp.

Nun tiu prestiĝo de Esperanto en Hungario estas danĝerigata! En la ŝtata radio ekde la 4a de marto oni nuligis la E-lingvajn elsendojn! Oficiala kaŭzo de ĝi estas la ŝparemo de la buĝeto, sed evidente ĝi estas nur malpeza preteksto, ja la kostoj de tiuj elsendoj estis la plej malaltaj el ĉiuj programeroj. (La elsendoj ĝis decembro okazis duonhoron, ekde decembro nur 10 minutojn semajne por enlandaj aŭskultantoj.)

La signifo de la nuligo de radioelsendoj estas multe pli ol la fakto mem, ja temas pri la prestiĝo de la Internacia Lingvo. Se ni, kiel ŝafoj, toleras ĝin, la sekva paŝo povas esti la nuligo de lerneja instruado, la nuligo de universitata fako, kaj aliaj...!!!

Hungaroj kompreneble ne restis mutaj. Aktivuloj ĉirkaŭ la teamo de *Eventoj* organizis kampanjon kontraŭ la decido, sekve de kio venis plurcent (!) protestleteroj al la radia estraro, pluraj E-organizoj turnis sin al la kleriga ministerio, kaj la 4an de marto en Budapeŝto estis organizata tre sukcesa surstrata demonstracio, pri kio raportis pluraj radiostacioj kaj tagĵurnaloj! Rezulte de tiuj agoj, la respondeculoj en la estrato de Radio paŝo post paŝo retiriĝis. Komence ili ŝanĝis la vortuzon de "nuligo de radioelsendoj" al "provizora ĉesiĝo", kaj post la demonstracio ili menciis jam eblan restarton en somero aŭ aŭtuno.

Por ne lasi perdi la aferon, ni bezonas ankaŭ vian helpon! Ni petas vin skribi ĝentilan protest-leteron pro la nuligo, ja tiu afero ne rilatas nur al Hungario, sed al la tuta E-komunumo. En nia kampanjo ni emfazis, ke la E-lingvaj radioelsendoj simbolis la lingvan demokration en Hungario (la ŝtata radio elsendas en kelkja, sed ne en multaj lingvoj). La nuligo signifas mutigon de tiu movado, kiu laboras por la lingva egaleco, por la lingva demokrati! Kaptu la okazon, kaj petu la ebligon de la aŭskultado de budapeŝtaj E-programoj pere de kurtondaj kaj satelitaj elsendoj, al kiuj ja la teknikaj kondiĉoj estas donitaj! Petu la plilongigon kaj plioftigon de tiuj

(Daŭrigo sur la paĝo 4)




Poezia Angulo

KANZONOJ DE L' GENIL'

La rivero
 la vivo kaj mia songo,
 Mia tuta vivo songante
 marborde,
 Ŝpirante
 inter la flava lumo
 kaj la rulanta akvo.
 Ĝuo kaj doloro pro la songo
 kun ĉi vekanta songo
 kiu neniam vekigos

Forgesi, nur kiam mi jam estos morta.



La boato
 sen remiloj.
 La vespero dormanta,
 la akvo ensilenta.
 Subite, voĉo:
 La boato foriras !
 Ŝi, sur la balkono
 sopiras en la eŝo
 La amo foriras!

JUAN REJANO
 Kordovo 1903-Meksiko 1976



Esperanto en la lernejo

Esperanto en lerneja foiro

De la 12a ĝis la 16a de februaro okazis en Stuttgart la granda lerneja foiro *Interschul* kun pli ol 60000 vizitantoj.

Unufoje Germana Esperanto-Asocio tie havis standon, kaj la interesigo superis ĉies atendojn. Oni allogis la interesatojn per lotumado, en kiu oni povis gajni unuavice senpagan partoprenon en kelkhoraj E-kursoj en diversaj urboj.

Ĉiu dua loto gajnis, kaj malgajnintoj havis la ŝancon tiri du pliajn lotojn post plenigo de enketilo. Finfine pli-malpli ĉiu serioza interesato gajnis, kaj entute pli ol 400 homoj enskribis sin por la kursoj.

Cento da instruistoj serioze interesiĝis pri la ebleco mem instrui Esperanton ekzemple kadre de *projektsemajno*, kaj ne malmultaj tuj aĉetis lernolibron aŭ vortaron. Ankaŭ la renoma eldonejo *Langenscheidt* ofertis ĉe sia stando diversajn Esperanto-vortarojn.

ULRICH MATTHIAS

umatthia@urz-mail.urz.uni-heidelberg.de

Laŭ Eventoj 0097

Finita eksperimento

Estas finita la du-jara propedeŭtika eksperimento, okazinta en 4 elementaj lernejoj de Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio, organizita de *InterKulturo*, sub la gvido de Zlatko Tišljar.

La eksperimento montris, ke la lernintoj de Esperanto jam unu jaron poste estis en la angla, resp. en la germana 30-35% pli bonaj ol la nelernintoj, kio signifas ke post du jaroj tiu tendenco kreskas proksimume al 80%. La kompilita raporto estis sendita al la Scienca Ministrejo de Slovenio kaj al EŭropUnia datumbanko pri sciencaj esploroj.

En 1995 *InterKulturo* akiris propran ejon (etan oficejon de 16m²) danke al kredito de aŭstra banko. La nova adreso (kie estas akirebla ankaŭ la raporto pri la propedeŭtika eksperimento): Besednjakova 1, SL-62000 Maribor, Slovenio.

Helpu per viaj leteroj!

Antaŭ longe funkciis la sola universitata branĉo de la Esperanto-movado en la ŝtato Alagoas (Brazilio) en la Universitato Federacia de Alagoas (UFAL). Bedaŭrinde la branĉo nuntempe estas minacata malaperi pro nescio pri Esperanto. La estroj de UFAL decidis ke la ejo uzata de la esperantistaj universitatanoj estu uzata de alia branĉo.

(Daŭrigo sur la paĝo 21)



10 sciindaj aspektoj pri Esperanto...

... kaj la Sporto

- ❶ La unua asocio kiu grupiĝis la esperantistaron pro sia sportemo estis la SPORTA ESPERANTISTA LIGO, fondita en 1922 de la fina Yrio OJANDER. La agado de ĉi asocio daŭris ĝis la jaro 1927. Nuntempe ekzistas la Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI) fondita en 1980, kies celo estas diskonigi Esperanton inter biciklantoj kaj biciklemon inter la esperantistoj; kaj la Esperanta Ŝakligo Internacia (ESLI) grava asocio fondita en 1958, kiu grupigas pli ol 100 ŝakistojn de la tuta mondo kaj organizas ĉampionecojn pri ŝako.
- ❷ Kiel dirite, ene de la Esperanto-Movado oni organizas diversajn internaciajn ĉampionecojn pri ŝako. En 1983 okazis la la Ŝak-Olimpiko de Esperantistoj en Kalocsa (Hungario): partoprenis 20 teamoj de 7 landoj. Same en 1993 ESLI okazigis sian lan Mondĉampionadon por esperantistoj en la urbo Tulcea (Rumanio). Partoprenis 18 ŝakludistoj kaj venkis la rusa Aleksandr PODIMOV.
- ❸ La unuaj sportaj eventoj kiuj uzis Esperanton antaŭ kaj dum sia organizado estis la Internacia Laborgimnastika Kunveno en Nürnberg (1929); la 2a Laborista Olimpiado en Vieno (1931) kaj la Spartakiado en Moskvo (1931). Okaze de ĉi sportaj aktoj multaj esperantistoj deĵoris kiel informantoj, gvidantoj kaj helpantoj.
- ❹ Sendube la plej famaj sportistinoj kiuj parolas Esperanton estas la tri fratinoj POLĜÁR. Judit, Zsuzsa kaj Zofia POLĜÁR estas tri hungaraj fratinoj kies gepatroj, geesperantistoj, edukis ilin tre speciale, la ŝakludo kaj la lingvoj, inter ili kompreneble Esperanto, ludis specialan rolon dum ilia instruado. Ili partoprenis esperantistaj ŝakaranĝojn ĝis la mezo de la 80aj jaroj, tamen poste ili ekludis profesinivele. Nuntempe Judit POLĜÁR estas la unua knabino gajninta knabajn mondĉampionadojn, kaj laŭdire ŝi estas la unua virino kiu estontece kapablos esti ŝakluda mondĉampiono, titolo ĝis nun nur atingita de viroj. Ankaŭ Zsuzsa POLĜÁR sukcesas ŝaklude, ŝi estas la unua virino en la mondo kiu iĝis grandmajstro, kaj ŝi atingis antaŭ kelkaj monatoj en Jaeno (Andaluzio) la virinan mondĉampionecon.
- ❺ Okaze de la Olimpiaj Ludoj la esperantistoj ne hezitis propagandi favore al Esperanto. En la Olimpikoj de Munkeno en 1972 Ralph HARRY, fama esperantisto kaj tiatempa aŭstralia ambasadoro en Germanio, publikigis la broŝuron *Esperanto: Lingvo de Sporto*. Alie, mencias diri ke Ralph HARRY estis invitita por gazetarkonferenco en la Olimpia Vilaĝo de Munkeno la 5an de Septembro de 1972, ĉi tiu estas la unua akto nuligita



pro la teruraj eventoj okazitaj ĉe la israela loĝejo en la Olimpia Vilaĝo en tiu sama tago.

⑥ Ankaŭ okaze de Vintraj Olimpikoj Esperanto divastiĝis. Okazis en 1988 en la kanada urbo Kalgario, sidejo de la tiujara Vintraj Olimpiaj Ludoj. La loka Esperantista Grupo eldonis 120paĝan libreton kiu enhavis pli ol du mil sportajn kaj turismajn terminojn kaj esprimojn en Esperanto, franca kaj angla lingvoj. La titolo de la libro estis *Saluton, Amiko*.

⑦ Kelkaj amatoraj sportteamoj portis kaj portas esperantistan nomon. En Brazilo ekzistis futbalteamon nomita ESPERANTO kaj alia en Togolando (Afriko). En Hispanio ekzistis amatora basketbala teamo en la vilaĝo Callosa de Segura (Alikanto), urbeto fama pro sia esperantista divastigado.

⑧ Alia sporto tre ŝatata de la esperantistaro estas la skio. Ĉiujare okazas Esperantista Skisemajno kun oficialaj konkursoj, kelkfoje eĉ neesperantistaj gazetoj komentas pri ili.

⑨ Okaze de la Monda Futbala Ĉampionado Hispanio82, oni organizis de la Madrida Esperanto-Liceo INTERNACIA SPORTA SIMPOZIO: sep prestiĝaj diversnaciaj esperantistoj konferencis en Madrido pri diversaj temoj, sed ĉiuj rilataj al sporto. La prelegoj kune kun kvarlingva sporta terminaro (hispana, angla, franca kaj esperanta) estis eldonataj de la Hispana Supera Sporta Konsilantaro.

⑩ Granda sportisto favora al Esperanto estas la brazila futbalisto Edson Arantes do Nascimento PELÉ, kiu en 1971, okaze de la publikigo en Esperanto de sia biografio *Mi estas Pelé*, deklaris: "Esperanto estos tre utila al la sportistoj ĝenerale por ilin alproksimigi kaj faciligi al ili la interrilatojn amikajn kaj sportajn". Dek jarojn poste li deklaris en Budapeŝto: "Proksimiĝas la tempoj, kiam la uzado de Esperanto estos jam tute natura. Kaj ne nur en la sporto, kiel mi antaŭdiris iatempoj, sed en ĉiuj sferoj de la sociaj kontaktoj, ankaŭ en la politiko kaj en la artoj".



AEU disponas korespondajn kursojn: bazan, mezan kaj superan. Diversajn prezoj, diversaj opcioj. Kaj vi ĉiam havos la helpon de korespondan instruiston. Kontaktu AEU, p.k. 864, 29080 Malago.



Paĝoj de nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

En la jaro 1909 oni lanĉis la ideon organizi Internacian Ekspozicion en Sevilo, sub la ĉefa celo diskonigi la artefaradon, industrion, komercon kaj kutimojn de la iberoamerikaj landoj. La pretendoj de aliaj urboj, kiel Bilbao kaj Barcelono, organizi similan eventon igis necese "disdoni" la aktojn inter tiuj urboj: Bilbao organizus industrian kaj komercan ekspozicion; en Barcelono okazus internacia ekspozicio; kaj fine Sevilio organizus iberoamerikan ekspozicion. La elektita dato estis la somero de 1914. En 1911 sevila simpatianto al Esperanto Guillermo CONRADI apogis la okazigadon de tiu ekspozicio kaj li proponis kunlaboradon inter la Organiza Komitato kaj la Sevila Grupo de Esperanto, ĉar, kiel li indikis en sevila ĵurnalo "estus tre konvene okazigi en Sevilo la Universalan Kongreson ĉar Esperanto povus altiri la atenton de la gepartoprenantoj en la Iberoamerika Ekspozicio". Ĉi bonintenca propono estis tuj respondata de la Sro Trinidad SORIANO, prezidanto de la Sevila Esperanto-Grupo kaj UEA-delegito en tiu urbo, li argumentis ke la ideo okazigi en Sevilo la Universalan Kongreson samtempe al la Iberoamerika Ekspozicio estos tute nerealigebla pro la fakto ke tiu kongreso en la jaro 1914 okazos en Parizo (Francio), tamen estos konvene pripensi la eblecon organizi iberoamerikan kongreson, sed por plenumi tion oni devus ricevi fortajn apogojn de la ceteraj Esperantogrupoj de Hispanio kaj eĉ de Portugalio. Tiu kongreso estus tre fruktodona por la movado de tiuj amerikaj landoj kie oni jam komencis diskonigi la esperantistan ideon, t.e Argentino, Urugvajo, Ĉilio, Venezuelo, Meksiko, Brazilo kaj Kubo.

Finfine la Iberoamerika Ekspozicio okazis en la jaro 1927, kaj ke la Universala Kongreso de Parizo ne okazis, ĉar la 2an de Aŭgusto de 1914, dato de la inaŭguro de la Kongreso, estis ankaŭ la komenco de la unua mondmilito. Sed ankaŭ instruas nin la esperantista historio, ke jam en la iaro 1911, kiam nia lingvo estis apenaŭ 20jaraĝa, laboremaj andaluziaj esperantistoj estis pretaj akcepti tutmondajn esperantistojn okaze de UK.

Ĉi konitaĵojn ni povas oferi al Vi dank'al la ekzisto de la Arĥivo de AEU, kie ni pretendas gardi ĉion rilatan al la Esperanto-Movado en Andaluzio. Tamen, ni volas krei veran arĥivon, la arĥivo de Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj E-revuoj aŭ esperantaĵoj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bv. kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU
POŝTKESTO 611 — E-14080 KORDOVO.



Radioamatora Angulo

La *Boletín Oficial del Estado* (Hispana Ŝtata Bulteno) publikis la pasintan 7an de Marto ordonon de la Departemento pri Telekomunikado kiu prizorgas la uzadon de CB-27 radioelsendiloj. Kvankam ĉiuj interesiĝantoj sendube jam konas la enhavon de la nova regulado, ni volas profiti ĉi paĝon por substreki la plej gravajn aferojn.

- Ĉiaj CB-27 radioelsendiloj devas peti permeson por ekelsendi, escepte tiuj porteblaj, pli konataj kiel *walkies*, malpli potencaj ol 100 Mwatoj, kiuj havas ĝeneralan permeson por elsendi. La rajtigo validos dum 5 jaroj.
- La CB-27 radielsendiloj apartenas al unu el la jenaj grupoj:
 - fiksaj, kies anteno staras ĉiam samloke
 - moveblaj, kiuj povas esti uzataj ene de vehikloj, ĝenerale aŭtomobiloj
 - porteblaj, tiuj kiuj havas la anteno kaj la energi-fonto samloke.
- Povos peti permeson ĉiuj fizikaj personoj; ankaŭ la juraj personoj, ekz. asocioj, kies celo estas eduka, kultura, libertempa...
- La antenoj de la fiksj radioelsendiloj devos stariĝi sur terasoj: oni malpermesas la horizontalaj antenojn.
- La kanalo 9a (27'065 MHz) estos perfore uzata por urĝaj kaj helpemaj aferoj.

- La identigiloj de la radioelsendantoj ili nomiĝos jene:

signifas

Bando; XX

provinca

0 4

14 Kordova,

Huelva, 23

41 Seviljo, 51

YYY = tri literoj

radioelsendant

AAA ĝis

grupoj

S O S ,

tiuj kies komenco estas la liero

- La nova regulado ne sufiĉe bone kio akazas

ŝanĝiĝas, ekde nun ECB-XX-YYY. (ECB Hispana Civitana korespondas al la laŭ la poŝta kodo: Almerio, 11 Kadizo, 18 Granada, 21 Jaeno, 29 Malago, Ceŭto, 52 Meliljo; por ĉiu o: ili iras ekde ZZZ, escepte la DDD, PAN, TTT, XXX kaj Q).

klarigas





(Daŭrigo de la paĝo 20)

al la antikvaj identigiloj, tamen mi kontaktis kun la departemento pri telekomunikado kaj oni indikis al mi, ke ili restas tute samaj, la novaj indikiloj validas nur por la novaj permesoj.

- Pere de sama identigilo oni povas uzi ĝis 3 CB-27 radioelsendilojn, tamen ili ne povas esti samtipaj, t.e., oni ne rajtas uzi 2 moveblajn radioelsendilojn, aŭ 2 fiksjajn kun la sama identigilo. Tio signifas ke CB-radioamatoro povos uzi sub la sama nomo unu fiksan elsendilon, alian moveblan ikaj alian porteban (kompreneble ĉi lasta pli potenca ol 100 Mwatoj, ĉar sub ĉi potenco permeso ne estas bezonata).

Aliaj aspektoj de la nova regulado

ne estas esence gravaj, aŭ restas tute similaj al tiuj jam ekzistantaj. Kompreneble ĉiaj detaloj pri la ordono pri la regulado de CB-radiostacioj estas konsulteblaj ĉe la *BOE* de la 7a de Marto de 1996. Ekde la venonta numero de nia revuo, ni aperigos ankaŭ informojn utilajn ne nur por CB-anoj, sed ankaŭ pri radioamatoroj, parolante ankaŭ pri la agado de la esperantistaj tutmondaj radioamatoroj. Kompreneble informoj pri ĉi temoj estos tre bonvenaj (turnu vin al nia redakcio).

ECB7-I-046745
STACIO ESPERANTO



(Daŭrigo de la paĝo 16)

Pro tio ni petas al asocioj, instancoj, ktp. sendi apogleteron al la virektorino de UFAL (kiu respondecas pri lingvoj) kun kopio al rektoro por ke li vidu ke Esperanto funkcias ekster Maceio. Sendu la apogleterojn (en la portugala, hispana, angla, franca, germana aŭ/kaj Esperanto) al Prof. Margarida Maria Silva dos Santos, Proreitoria de extensao, Campus A.C. Simoes KM 14, BR-101, CP 57072-970 Maceio, Alagoas, Brazilio, kaj kopion al Magnifico Reitor, Prof. Rogerio Moura Pinheiro, Gabinete DH Reitoria, Campus A.C. Simoes KM 14, BR-101, CP 57072-970 Maceio, Alagoas, Brazilio.



(Daŭrigo de la paĝo 10)

sciencaj kampoj estas pli utila la **decimala** sistemo de numerado, komponita je 10 valoroj –reprezentitaj de dek ciferoj–: 0, 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, kaj 9, prenantaj la superaj valoroj potencojn de dek, ekz. $10 = 10E1$; $10000 = 10E4$. Ni ne konsideras en tiu verko aliajn eblajn sistemojn, kiel la **dudekan** de la maja popolo.


Konsekvence, kvankam nuntempe disvastiĝis la decimala sistemo por mezuri iujn aspektojn de la spaco, kiel la longitudo kaj la mason (pezon), tamen la sesdeka sistemo daŭre uziĝas por mezuri la spacon–tempon, kiel je la mezuro de la sfero kaj de la tempo, kaj ankaŭ aliaj sistemoj de mezuro, tamen malpli uzataj, kiel la anglo–saksa sistemo por la longitudo kaj la maso, kaj aliaj ĉe kulturaj areoj ne okcidentaj.

Koncerne la decimala sistemo, ni povas sugesti ĝian disvastigon je ĉiuj **aspektoj de la spaco–tempo**. Kiel ni vidos poste, jam pli ol 2000 jaroj antaŭe tiu sistemo estis uzita por mezuri la tempon, ekzemple de la greka popolo, kiu havis semajnon kompositan je 10 tagnoktoj, kaj ankaŭ la juliana kaj la gregoria kalendaro, kiuj dividas la tempon je 'jarcentoj' –do, po 100 jaroj. La nuntempa decimala sistemo estis adoptita en Francio je la fino de la

18a jarcento, kaj la franca revolucio aplikis tion al la kalendaro, kun semajno de 10 tagnoktoj; tamen, ties aplikado daŭris nur dum dektri jaroj.

Ni, Esperantistoj, ne nur devas intenci disvastigi l' internacian lingvon por l' interkompreniĝo de la popoloj, sed ankaŭ uzi ĝin por solvi aliajn problemojn, kiel la ĥaoso de kalendaroj, simila al la ĥaoso de lingvoj, por prezenti solvojn por ke la homaro mezuru pli science la spacon–tempon.

DRO. LUDOVIKO OĤER





Se vi ne trovas en *Gazeto Andaluzia* kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleon. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzion. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota) aŭ klare tajpita.

Esperanto Aplikata

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj via anonceto aperos en nia venonta *Gazeto Andaluzia*.

① Privataj entreprenistoj serĉas perantojn, kiuj bone parolas la hungaran aŭ slovan lingvon. Amika Rondo de Esperantistoj, ZS. Vizslay, 044 05 Janik 5, Slovakio.

② Huang Zhong, 22-j., deziras korespondi kun esperantistoj pri komuna entrepreno, kunlabora produkto, varinterŝanĝo kaj kompensa komerco. Adreso: Huangzhaicun 08 Hao, Xipo Guanqu, Donglizhen, Leizhou, Guangdong, Ĉinio.

③ Paco-Kompanio por Konsultiĝo pri Internaciaj Aferoj. Internacia

interŝanĝo de kulturaj kaj komercaj talentuloj; konsultiĝa servo por alilandaj investantoj, turistoj kaj fakuloj; importo kaj eksporto de komercaĵoj; servo por internacia geedziĝo; serĉo de esperantistaj aŭ neesperantistaj komercaj kunlaborantoj aŭ agentoj; starigo de dudirektaj agentejoj por ĉinaj kaj alilandaj entreprenistoj. Adreso: Direktoro s-ro Lin BO, P.O.Box 2, Hefei 230001, Ĉinio.

④ Alzacaj esperanto-vinoj: Philippe Gocker, 24 rue de Riquewihr, FR-68630 Mittelwihr. Fakso: (+33)89.49.04.72.

⑤ En januaro estis lanĉita nova Esperanto-vino en Kroatio. *Frambovin* estas likvora vino el framboj konvena por servi kun kukoj; en specialaj boteloj de duonlitro. Familio Ŝtefanĉić, Gornja Vrba; Vrpskih zrtava 83;



HR-35000 Slavonki Brod, Kroatio.

⑥ Inter la 13a kaj la 18a de julio en sudhungaria urbo Hódmezővásárhely okazos la 2a Eŭropa Medicina Esperanto-Konferenco. La programo antaŭvidas krom la fakaj prelegoj plurajn aranĝojn (folklor-danc-vesperon, barokmuzikan koncerton, mod-prezentadon...) kaj tutagan ŝipekskurson. Partoprenkotizo (inkluzivas ĉion), depende de la tempo de aliĝo, 100-110 USD. Loka Organiza Komitato de EMEK, s-ino Katarina Faragó, Pf. 89, H-6801 Hódmezővásárhely, Hungario.

⑦ Tranoktado: Vi vojaĝas tra Alzaco kun via familio. Abonantoj de TAKE-*La Domo* kaj iliaj geamikoj tranoktu apud Colmar, meze de la vitejaro en Centre de Mittelwihr, 16 rue du Bouxhof, FR-68630 Mittelwihr. Tel: (+33)89.47.93.09; fakso: (+33)89.49.02.25. Pri organizo de aranĝo, kontaktu TAKE, rue de Tiefenbach, 68920 Wintzenheim (Colmar), Francio, tel. 89.80.11.17, fakso 89.79.43.33.

⑧ Librería Álvarez, Luis Braille 8, Local B (apud la preĝejo *Ntra Señora de la Amargura*), Malago, Hispanio. Ankaŭ libroj en/pri esperanto.

⑨ Ĉiumonate la Komerco- kaj Industrioĉambro de Colmar kaj

Centra Alzaco (Francio) eldonas liston de ne-okupitaj ejoj, kiun ĝi disponigas senpage al informpetintoj serĉantaj ejojn profesiajn, komercajn, oficejajn, laborajn kaj ankaŭ terenojn. Ekde la fino de januaro 1996, tiu listo kun pli ol 200 adresoj estas konsultebla pere de Internet en la lingvoj franca, germana, angla kaj en Esperanto. Baldaŭ la bildoj de la proponataj objektoj estos montreblaj.

Konsultu <http://www.rmcnet.fr/ccl>; e-poŝto: ccl-colmar@rmcnet.fr.

⑩ Nepre mendu la novan vinlibreton eldonitan de TAKE: *Je via sanol (Elzaco kaj ties vinoj!)*. Formato A5, trilingvaj tekstoj (franca, germana, esperanto). Abundaj belegaj ilustraĵoj. Prezo: 35 FRF + sendokostoj.

⑪ *La Domo - Jarcento 21*. Trimonata revuo eldonata de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE). La revuo de la profesioj kaj de la servoj. TAKE, rue de Tiefenbach, 68920 Wintzenheim (Colmar), Francio.

⑫ Turismo. Por la 6a jaro, ni proponas laŭ kontrakto Esperanto-turismajn programojn por grupoj en la regiono de Angers, 300 km. okcidente de Parizo. Tranoktado sub tendo aŭ en hotelo. Kvintaga programo inkluzive de vizito al Parizo kun ĉiĉerono. ASPROS, "Les Nids", F-49190 Saint-Aubin-



de-Luigne, Francio. Fakso +33 (02) 41 78 47 75. Kunlaboranto de *Monda Turismo*.

13 Tradukado. Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto. 52 kunlaborantoj restas je via dispono por ĉiaj tradukoj inter 25 lingvoj. Informoj pri tarifo kaj tempo haveblaj ĉe Andrés Martín González, PK 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

14 Ni akceptas ĉiuspecajn laborojn. Senpagan kaj sendevigan informadon. Lundojn, merkredojn kaj vendredojn je la 7a vespere. Adreso: Bossa de Treball, Doctor Zamenhof 29, Barcelona. Tel: (93)3075570, matene.

15 Se vin interesas hispana patento pri pomado el naturaĵoj (olivoleo, abelvakso kaj aromoleoj) kontaktu min letere. Jesús García Martínez, c/ Alférez Beltrán Monchón 5-1^a-A, E-29007 Malago, Hispanio.

16 Dezirantoj dungi gehispanojn por vartado ("au pair"), turnu sin al Jesús García Martínez, c/ Alférez Beltrán Monchón 5-1^a-A, E-29007 Malago, Hispanio. Preferindas personoj kiuj parolas Esperanton.

17 *El Popola Ĉinio*. Monata revuo. 52 paĝoj ĉiunumere. Informoj pri la E-movado tra

lamondo. Raportoj kaj artikoloj pri Ĉinio. Peranto en Hispanio: Félix Gómez Martín, Corbeta 8-5^aA, 28042 Madrid.

18 *Heroldo de Esperanto*. La plej populara gazeto en la internacia lingvo. Peranto en Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell (Barcelona).

19 KEK-libro servo. Miksita literaturo, lernolibroj, poŝtmarkoj, diskoj, vortaroj... Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell (Barcelona, Hispanio).

20 Turismumi en Sirio per Esperanto. Kontaktu agentejon *Al Mukhtar* por viziti la landon. Adreso: Hikmat Maktabi (direktoro de *Al Mukhtar*), P.O. Box 1084, Aleppo, Sirio.

21 Clínica *Soly Mar*, en Murcia (Hispanio). Rabato por esperantistoj, 10%. Profitu ĝin okaze de ĉi-jara Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio. Kontaktu antaŭ LKK de la Kongreso. Ties adreso: 55a Hispan Kongreso de Esperanto, Asociación Socio-Cultural *Ĉielarko*, Gregorio Martínez Montesinos 3, 30580 Alquerías (Murcio).

22 Eksperto de neellaborita



kupro. KARAJANI Sh. p.k., Rr. "Seid Toptani" No 2, Tirana; telefono-fakso 00-355-42-23972.

②③ Vojaĝofice Tilio (Vladimir kaj Pavla Dvorák) proponas diversprezajn loĝeblecojn por la praga UK. Petu informilon: Ostravská 637, CZ-19900 Praha 9. Telefono/fakso: +42-2-899602.

②④ Fuoshan-a Specialŝtala Limigita Kompanio (A, No. 13, str. Sizhilu, CN-528000 Fuoshan, Prov. Guangdong) produktas nerustigajn ŝtallaminataĵojn diversipajn laŭ modernaj metodoj. Jara produktokapacito baldaŭ atingos 10 milojn da tunoj.

②⑤ Familia entrepreno importas (terpomojn, cepojn) kaj eksportas (gingembrojn, priprojn, kolaojn, bananojn) agrikulturajn produktojn; ankaŭ eksportas plastikajn produktojn (ŝuojn, telerojn, glasojn, ktp.). Inĝ. SEKA Hyacinthe, Ets. Seka & Sons, 03 B.P. 572, Abidjan 03 (Ebura Bordo). Fakso (225) 30-36-00.

②⑥ CL Batiment, 90 Rue du Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim-Colmar, fakso 89794333, ekde aprilo 1996 bezonas 500 tunojn da cemento (eŭropa kvalito CPJ aŭ CPA)

monate. Ankaŭ interesiĝas pri aliaj konstruaroj.

②⑦ Hispana eldonejo *Tradirecta* (pron. "tradirekta") serĉas artikolojn, librojn, filmojn, vidbendojn kaj tiel plu por ilin publikii. Ni deziras *sciencajn kaj teknikajn verkojn*, originale en esperanto aŭ en malmulte disvastigitaj lingvoj. Ni ne akceptas verkojn originale en la angla lingvo, nek tradukitajn al la angla lingvo. Jen nia adreso: entrepreno *Tradirecta*, s-ro Alexandre Xavier Casanova Domingo, c/ de las Peñuelas 18, 4^a C, 28005 Madrido (Hispanujo). Telefono (fakso-modemo kaj respondiloj): 34-1-5173027.

②⑧ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo proponas al vi:

-*Pandemonio*, aro da rakontoj de junaj hispanaj aŭtoroj (500 pesetoj)

-*Solo*. Disko de malaga esperantista muzikisto, ±25 minuta (500 pesetoj).


-*Aŭkcio de vivoj* (Lukiano), 12 paĝa broŝuro. Lukiano ridigas la helenajn diojn. (200 pesetoj)

-Esperanta Kurso Baza por PC-komputiloj. (1000 pesetoj) Plus sendokostoj. AEU, p.k. 864, 29080 Malago.

(daŭrigo de la lasta paĝo)

La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto", en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj "tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la "Fundamento de Esperanto", ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al la aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.



El memorenda vizitado de Murcio:

De maldekstre: D-ro Ovilo, la dekano de Fakultato pri Ekonomiko, S-ro Macanás, Ges-roj Selten kaj S-ro De las Heras.